

Claude GACOND konversacias kun Eugène de ZILAH pri la nova revuo La Gazeto

Radioprelego de Claude GACOND, SRI, 1986

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-166/Radiokasedo-166-86-7-B-1035-Claude-GACOND-konversacias-kun-Eugene-de-ZILAH-pri-la-nova-revuo-La-Gazeto.mp3>

Cl.- Vi aŭdas elsendon de Svisa Radio Internacia. Hodiaŭ Claude Gacond konversacias por la dua fojo kun Eugène de ZILAH, la redaktoro de la nova kultur-kleriga revuo La Gazeto. Sinjoro Eugène de ZILAH, vi iniciatas ne nur la eldonon de nova gazeto, sed samtempe novan entreprenon, kiun mi povus resume prezenti per la vortoj : doni al la esperantistoj la eblon kleriĝi koncerne Esperanton mem kaj helpe de Esperanto. Do estas vera speco de perkoresponda lernejo, aŭ perkoresponda gimnazio, perkoresponda universitato, ĉu ne ? Do, nun, vi eble diru al ni, kiel funkcias la redakta komitato de La Gazeto.

EdZ.- Jes, la redakta komitato en la komenco kompreneble temis pri du aŭ tri homoj, kiuj havis la ideon de ĉi tiu entrepreno, de La Gazeto, kiu estas la kleriga periodaĵo de la Monda Federacio de Kulturaj Asocioj. Kaj tre rapide, ĉar en ĉi tiu entrepreno ni bezonis la helpon fincan kaj ankaŭ rutinan, ĉiusemajnan de la tuta Metz-a Esperanto-Klubo. La Esperanto-Klubo de Metz, kiu estas esperanto-klubo do en urbo en Francio, en orienta Francio, estas sufiĉe granda klubo, kiu havas ĉirkaŭ kvardek esperantistojn, kiel membrojn, kiuj parolas Esperanton. Sed kiu ankoraŭ estas grava afero, ke ni havas ĉirkaŭ 150 simpatiantajn membrojn, kiuj estas homoj, kiuj akceptis la ideon de Esperanto kaj la celojn de Esperanto, sed ankoraŭ, aŭ ili ne havas la tempon por ellerni la lingvon, sed ili bonvolas apogi per laboro kaj per mono ĉi tiun entreprenon.

Cl.- Do, ili pensis ĉiuj aktive partopreni la agadon.

EdZ.- Jes, pro tio tre rapide la redakta komitato fariĝis tute normale la Metz-a Esperanto-Klubo. Kaj ĉiuj homoj do ĉeestas ĉiujn kunvenojn, ĉu ne ? Oni ricevas kune la leterojn, oni pridiskutas kune la artikolojn, ĉiuj donas siajn ideojn, ĉiuj proponas siajn kritikojn. Kaj la redakta komitato, finfine, estas la Metz-a Esperanto-Klubo. Kaj troviĝas ke mi estas ankaŭ la prezidanto de la Metz-a Esperanto-Klubo, do pro tio mi estas ankaŭ la redaktoro de La Gazeto.

Cl.- Kaj ĉiuj transprenas funkciojn laŭ siaj kapabloj, verŝajne.

EdZ.- Tute precize. Kaj estas homoj, kiuj nur balbutas Esperanton, sed kiuj tamen havas grafikan talenton, kiuj havas ideojn, kiuj vere kunlaboradas. Kaj post, kompreneble, la tri unuaj numeroj komencas alflui la kunlaboradoj de homoj, kiuj akceptis niajn ideojn, kiuj trovas ilin ĝustaj kaj kiuj proponas sian kunlaboradon. Kaj mi esperas, ke pli kaj pli la nivelo de La Gazeto altiĝas pro tio.

Cl.- Ĉu vi povus prezenti al niaj geaŭdantoj la grafikan aspekton de La Gazeto ?

EdZ.- Jes, ĉi tiu estis grava afero. Kaj oni preskaŭ devas rakonti anekdoton. Ĉar estis s-ro Daniel Nunmacher, kiu estas juna artisto franca, kiu ekhavis premiojn en ekspozicioj pri fotarto en Parizo kaj en Marseljo kaj en aliaj urboj, kiu estas intima amiko de unu el niaj klubanoj, kiu estas pli-malpli esperantisto, tamen neniam li pagis aliĝkotizon al la klubo. Kiu ŝatis la ideon de La Gazeto kaj kiu diris al mi : do li bonvolas senpagi fari al ni projekton tute

modernan kaj novan la grafikan aspekton. Kaj li fakte faris tion, kaj la kondiĉo estis, ke ni nenion povas ŝanĝi en ĉi tiu aspekto, ĉar li volis ĝin esti, kiel ĝi estas. Kaj ni bone vidis, ke ĝi estas tre moderna. Ĉi tiu kompreneble ne tro plaĉas al ĉiuj. Sed oni devas diri, ke la tuta klubo kaj la kunlaboraro estas homoj de la nova ondo de esperantistoj. Ofte tre junaj homoj. La meza aĝo de nia klubo ne estas pli ol 24.

Cl.- Jes. Do, tiu grafika aspekto ĝuste donas karakteron al la organo, originalaĵon, ĉu ne? Sed ĉu tiu grafikisto rigardas poste la pluan evoluon kaj konsilas vin por ĉiu numero?

EdZ.- Jes, li konsiladas nin por la uzado de ĉi tiu aspekto, kaj kiam oni bezonas novajn desegnaĵojn aŭ novajn aferojn, li faras. Sed, li estas, kiel mi diris, amiko de unu el niaj klubanoj, s-ro Pascal Borte, kiu estas, kaj de mia filo, s-ro Edgar de Zilah, kiu estas profesia fotisto. Kaj ili faras la makedojn. Kaj en la farado de la makedoj ili ĉiam telefonadas al s-ro Nunmacher por scii, kion fari, kiam estas iu problemo. Ĉar oni devas aldoni - kaj ĉi tiu estas grava afero en La Gazeto - ke la kadro de la gazeto, la grafika kunmetaĵo estis konceptita por la plej efika uzado de komputiloj.

Cl.- Jes. Kaj pri la komputio, kiu manipulas ĝin ?

EdZ.- Ho, la komputiloj, vi scias, estas ilo, preskaŭ ĉiuj manipulas ĝin. Eĉ mi mem. Mi mem uzadas ĝin, kiel grandan tajpmaŝinon, kaj estas do programoj pri desegnaĵoj, kaj preskaŭ ĉiuj kapablas. Ni diru, ni havas ses aŭ ok homojn en la klubo, kiuj povas uzi la komputilojn, ĉar fakte ni havas plurajn.

Cl.- Jes. Kaj ĝi troviĝas en via hejmo ?

EdZ.- Unu el ili troviĝas en mia hejmo, jes. Kaj tie oni kunvenadas la plej ofte. Vi scias, ni havas nian kunvenejon en la urbo kaj la dua kunvenejo estas tamen mia loĝejo. Ĉi tiu estas ankaŭ amika rondo, ĉi tiu klubo esperantista de Metz.

Cl.- Sed vi diras unu el ili. Kaj la alia, la alia komputilo ?

EdZ.- La alia komputilo troviĝas, unu en la sidejo de nia klubo, kiu estas la kulturdomo de Metz, kiu estas sufiĉe potenca, kaj estas du aliaj komputiloj, kiuj estas personaj havaĵoj de du el niaj membroj. Do, s-ro Pascal Hember kaj alia membro, kiu havas ankoraŭ komputilon.

Cl.- Kaj per diskoj vi povas iri de komputilo al la alia?

EdZ.- Bedaŭrinde ne! Bedaŭrinde estas teknikaj malfacilaĵoj, ĉar la komputiloj ne estas samtipaj. Do, ili ne uzas la samajn disketojn. Mi ne volas fari ĉi tie reklamon pri komputiloj, do mi ne diras la markojn, sed bedaŭrinde ili estas el kvar diversaj tipoj.

Cl.- Estas iomete kiel por la lingvoj, ĉu ne ? Inter la lingvodiferencoj ni bezonas interlingvon, inter la komputiloj ni bezonos baldaŭ interkomputilon, ĉu ne ?

EdZ.- Bedaŭrinde.

Cl.- Sed s-ro de Zilah, vi bonvolu diri pri la maniero aboni al via organo La Gazeto.

EdZ.- Unue la abonprezo. La jarabono kostas por ses numeroj 12 ekuojn. Ekuo estas la monunuo de la Eŭropa Ekonomia Komunaĵo. Kaj ĝi valoras do ĉirkaŭ 81 francajn fankojn, 22 svisajn frankojn, mi ne povas eldiri ĉiujn monunuojn, kaj la plej simpla estas kompreneble ĝiri al ni poŝte al la adreso, kiu troviĝas en La Gazeto la monon. Oni povas ankaŭ sendi simplan leteron dirante, ke oni volas aboni kaj poste ni klarigos kiamaniere aboni. Eĉ por homoj el nepagipovaj landoj, kiuj povas aboni pere de sendado de libroj aŭ pere de kunlaborado, aŭ alimaniere oni povas tion vidi. Estas nur por helpi niajn samideanojn en nepagipovaj landoj.

Cl.- Ni donos vian adreson, do estas : 39, strato Joseph Hénot, Francio, urbo Metz, 57070. Sed la plimulto de niaj aŭskultantoj simple, se ili havas intereson, skribu al Svisa Radio Internacia, petu informojn kaj ni transsendos la informpetojn.

Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude Gacond refoje konversaciis kun d-ro Eugène de Zilah, la redaktoro de la nova revuo, La Gazeto. Ĝis reaŭdo!

Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), januaro 2014